Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Januaro 2003
ISSN 1163.0442

74-a jaro, n-ro 1 (1171)
MENSUEL/MONATA

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

http://www.sat-esperanto.org/ * retadreso: satesper@noos.fr**

MICHEL DUC GONINAZ
esperantisto de la jaro 2002

paĝo 3



Nia laŭreato dum la lasta vizito al la sidejo de SAT
de maldekstre: gek-doj Schram, de Weerd, Duc Goninaz kaj Bannier

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj,

ni eniris en la novan jaron kun espero ke ĝi estos pli bona ol la lasta. Ĝi komenciĝas per la proklamo de la esperantisto de la jaro, kaj temas pri nia k-do Michel Duc Goninaz. Gratulon al li kaj al ĉiuj kiuj kontribuis al la apero de la Nova PIV.

En tiu ĉi numero vi trovos sufiĉe multajn informojn pri nia kongreso en Ĉaŭdefono. Aliĝu tuj ! Ne atendu la lastan momenton. Ankaŭ vi trovos informojn pri la antaŭkongreso en Grindelvaldo.

Espereble kelkaj aliaj artikoloj ankaŭ interesos vin kaj provokos debaton.

Via redaktoro daŭre ripetas siajn invitojn al kunlaboro. Sendu viajn informojn per reto aŭ per normala poŝto al la adreso de la SAT-sidejo, ĉar ni bezonas materialon por la venontaj numeroj de Sennaciulo.

Atendante vian kunlaboron, kamaradece salutas vin, via

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

S.A.T. EN BRITIO
16-18 Majo 2003
Ĉe la NOVA Brita E-Centro*

Pasigu ĝuindan stimulan semajnfinon inter la laboristaro en bela kampara domo. Gary Mickle (el Germanio) parolos pri naciismo kaj novdekstrismo; krome estos politika forumo, diskutrondoj, lingvokliniko, distra vespero kaj bona manĝo. Prezo : proks. 65 £ aŭ 100 €.

Por pliaj informoj kaj programo, bonvolu turni vin al:

Derek Tatton (li scipovas Esperanton)
Wedgwood Memorial College
Barlaston
Stoke on Trent
Staffordshire, ST12 9DG
Tel. 44-1782-372105
rete: Weedgwood.college@staffordshire.gov.uk

*La loko estas atingebla trajne el Londono (2h30). Pli proksimaj flughavenoj troviĝas ĉe Manchester, Liverpool, Birmingham kaj East Midlands.

El ĉiu LEA ni estas pretaj gastigi unu homon senpage. Por pliaj informoj **nur pri tio**, kontaktu :
Arturo Prent
7 Walton Gardens
Hutton, Brentwood,
Essex CM13 1EJ
Tel. 01277-228962, rete: arturo@signalprent.demon.co.uk



Nova PIV aperis !

Akiru ĝin ĉe SAT.

Prezo:70 € + afranko

Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €

ekster Eŭropo : 10,06 €

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

MICHEL DUC GONINAZ esperantisto de la jaro 2002



Dum la lastjara Festo de la gazeto l'Humanité estis organizita prezentado de la Nova P.I.V. kun diskuto.
De maldekstre : Vincento Charlot, Michel Duc Goninaz kaj s-ro Claude Longue-Epée

KALININGRAD (Ruslando). Franca profesoro Michel DUC GONINAZ estas proklamita «la Esperantisto de la Jaro 2002». La internacia ĵurio elektis lin pro la eldono de la Nova Plena Ilustrita Vortaro, kies reviziadon li gvidis dum pluraj jaroj. La voĉdonado pri la Esperantisto de la Jaro okazas ĉiujare ekde 1998 laŭ iniciato de «La Ondo de Esperanto». Pliajn informojn pri la projekto legu en la retejo de «La Ondo» http://Esperanto.Org/Ondo -- rubriko «La Esperantisto de la Jaro». [Informas: Halina Gorecka, sekretario]

El «HEROLDO KOMUNIKAS»
La internacia revuo "La Ondo de Esperanto" (Kaliningrad, Ruslando) iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Ĉi-jare la kandidatigantoj proponis 18 personojn, al kiuj la elektantoj povis doni siajn voĉojn. La voĉdonado finiĝis je la Zamenhofa Tago, la 15an de decembro, kun jena rezulto: **Michel DUC GONINAZ estas proklamita «la Esperantisto de la Jaro 2002».**
La internacia ĵurio elektis lin pro la eldono de la Nova Plena Ilustrita Vortaro, kies reviziadon li gvidis dum pluraj jaroj.
Iama profesoro pri slavistiko kaj esperantologio en la universitato de Aix-en-Provence (Francio), Michel Duc Goninaz havas longan esperantistan vivon. Aktiva same kiel Gaston Waringhien en la SAT-medio, li transprenis leksikografie lian gravegan moralan kaj sciencan heredaĵon. Didaktike kompetenta, li aŭtoris interalie tre utilan vortaron, eldonitan de komerca entrepreno, kun terminoj grupigitaj laŭ semantikaj familioj. Literature fajna, li interalie tradukis la verkon de Albert Camus "La fremdulo". La eta kuriozaĵo: estas li la juna policisto kiu tajpas la konfeson donitan de la edzino de Karleto (Jana Flego) al la komisaro (Raymond Schwartz) en la filmo "Angoroj" de J.-L- Mahé (1963).

Kamarado Duc Goninaz deklaras ke tiun honorigon li deziras dividi kun KLAŬDO ROUX, kun ĉiuj aliaj kunlaborantoj kaj kun SAT kiu realigis la eldonon.

La Plenum-Komitato de SAT sincere kaj kun plezuro gratulas al nia kamarado pro tiu meritata distingo kaj dankas al li pro la farita laboro. Ni samtempe dankas al k-do Klaŭdo Roux kiu faris praktike same ampleksan laboron kiel Michel, al Serge Sire pro la desegnoj kaj al ĉiuj kunlaborantoj kaj subtenantoj sen kiuj tiu verko ne povus realiĝi.

K.B.

LA STATO DE NIA MONDO

Ĉi kune ni prezentas tre interesajn ekstraktojn pri la stato de nia mondo el la artikolo de Anne-Marie Ducroux, aperinta en la libro "»La novaj utopiistoj de la daŭra evoluo», de la sama aŭtorino. Eldono: «Autrement - Collection Mutations n-ro 216.

La modelo de evoluo de la homaro per la ekonomia kresko, kvanta, montras pli kaj pli siajn limojn en okcidentaj landoj same kiel en la «landoj malpli progresintaj». Ĝi pasis en tridek jaroj de 25 al 49. Ĝi duobliĝis kaj la kialoj estas tre diversaj. La situacio en tiuj landoj, kiujn oni nomas «tria mondo» estas ankoraŭ pli kompleksa. La manieroj kaj kondiĉoj de helpo estas reviziendaj. «Mil miliardoj da dolaroj estis elspezitaj por la helpo al evoluo depost la jaro 1960, sed la rezultatoj ne estis je la nivelo de la elspezita sumo. Mil miliardoj…! Tio respondas al la gravaj sumoj repagitaj pro la kontraktitaj ŝuldoj. En la serĉado de alternativaj elektoj por PED (evoluantaj landoj) la streboj devas baziĝi sur la principoj de daŭra evoluo. Fakte, la komerca liberalismo kontribuis al la difektado de ekonomioj de multaj evoluantaj landoj, ĉar ĝi eksponis ilin al la necerteco de la internacia merkato. Do, estas malĝuste diri ke evoluantaj landoj profitas de la ekonomia integriĝo» asertas Joseph E. Stiglitz.

La ekonomia kresko estis la celo de internaciaj institucioj. Ĝi inspiris al la kontado de naciaj riĉecoj kaj la maniero mem pensi la valoron. La riĉecoj ĝenerale pligrandiĝis. La monda nacia produkto estis multiplikita per 16 de la komenco de la jarcento. Por kelkaj, la vivnivelo kaj kvalito de la vivo progresis. La demografio sekvis.

Sed la ŝoko troviĝas en la distribuo : en la jaro 2000 la mondaj interŝanĝoj de valoroj kaj servoj atingis 7,6 miliardoj da dolaroj, kaj tiu de justa komerco je ĉirkaŭ 400 milionoj. Certe, tiuj lastaj progresas, sed la asimetrio estas ankoraŭ giganta. En 1998, 20 % de la monda loĝantaro vivis per malpli ol 1 dolaro tage - kio estas 1,2 miliardoj da homoj - , kaj ĉirkaŭ 40 % de la mondloĝantoj per malpli ol 2 dolaroj tage. Tio prezentas 50 % pli ol estis antaŭ 20 jaroj. Por OECD, longe subtenanto de libera interŝanĝo «la diferencoj de enspezoj estas multe pli grandaj hodiaŭ ol en la komen-



La detruo de la arbaroj daŭras

c o

de la jarcento». La diferenco inter la 5 plej riĉaj landoj kaj la 5 plej malriĉaj estis de 3 kontraŭ 1 en 1820, 35 kontraŭ 1 en 1950, 72 kontraŭ 1 en 2000. Dudek procentoj de la mondaj loĝantoj konsumas okdek procentojn de la komunaj konsumaĵoj. 20 % el la monda loĝantaro profitas kaj 20 % apenaŭ travivas. Dudek landoj reprezentas 81 % de la BNP de la planedo. Por Pierre Le Roy, kiu publikigas en "Globeco", en 2002, la indicojn de globaligo, la diferenco de BNP inter la miliardo de riĉaj kaj miliardo de malriĉaj pligrandiĝis nur en unu jaro je 10 %.

Eĉ la entreprenoj kiuj ĝis nun apenaŭ interesiĝis pri la ĝeneralaj interesoj, komencas kompreni ke tiaj kontrastoj ne plu estas akcepteblaj aŭ ke ilia estonta vendotereno povus esti hipotekita pro manko de evoluo aŭ per detruado de medio, kio certe malbonifluos la ekonomian kaj socialan vivojn. En la pintkunveno nomita "Millenium", 149 landoj kaj la Monda Banko, la FMI kaj OCDE devis antaŭvidi kiel perspektivon kaj neceson de la jarmilo, malpligrandigi la malriĉecon je la duono de nun ĝis la jaro 2015.


La sama asimetrio estas ekvivalenta en la mondaj registaroj, kaj la prezi-

danto de la Monda

Banko mem diris: «Necesas ke la evoluantaj landoj preparu siajn proprajn programojn kaj faru proprajn elektojn». La programo de UNo por la evoluo klare indikas ke en la internaciaj negocoj la landoj kun forta homa evoluo estas sisteme malpli reprezenataj. Eŭropo, la unua monda komerca forto, la unua monda investanto, unua gvidanto al publika helpo por evoluado, havas voĉdonrajtojn superajn al aliaj mondaj regionoj, sed ĝi tre malofte sukcesas paroli unuanime. Ĝi havas povon por pezi pli ol Usono, kiu rekte influas ĉiujn internaciajn organizojn eĉ ne pagante sian kontribuon al la UNo. Estas la privatuloj kiel Ted Turner aŭ Bill Gates kiuj parte transprenis la financadon.

Tio kion posedas nur kelkaj individuoj egalas al la ŝtataj buĝetoj, reprezentas la kontribuon de milionoj da homoj. Inverse, por la programo de UNo por evoluo, 4% el la plej grandaj riĉaĵoj kovrus la aliron al bazaj

bezonoj de ĉiuj homoj de la planedo. La diferencoj prezentiĝas same per la riĉecoj de ŝtatoj kaj de entreprenoj. Ekzemple, General Motors ebligas la vivon de 9 milionojn da personoj, enkalkulante ĝiajn salajrulojn, tiujn de kunlaborantoj kaj iliajn familiojn. Nur 26 landoj havas pli grandan buĝeton ol ĝi. Laŭ aktuala ritmo, la 100 plej grandaj mondaj entreprenoj prezentos 30% de interna bruta produkto (IBP) en 2010 kaj 50% en 2030. Ĉu estas normale? - demandas sin Perre Le Roy.
Fine ekzistas alia malekvilibro kiu pligrandigos la antaŭajn: la koncentrigo de centroj de teknologiaj inventaĵoj, aŭ tiuj de patentoj. 91% de patentoj troviĝas en OCDE (Organizo de kooperado kaj ekonomia evoluo).


Ĉiuminute ni perdas ĉirkaŭ 26 hektarojn de arbaroj, kio egalas al 37 futbalterenoj.

Oni konsideras la Okcidentajn landojn pli stabilaj, sed ankaŭ por ili la malegalecoj interkruciĝis inter la jaroj 1980 kaj 1990, laŭ la raporto de PNUD (Programo de UNo por evoluo). En Francio, la vivnivelo, vivespero, instruado vere progresis, malegale distribuita, sed la diferencoj malgrandiĝis. En dek jaroj la nombro de familioj pagantaj imposton sur la riĉeco pligrandiĝis de 85,7%. Unu procento de francoj, la plej riĉaj, posedas 15 ĝis 20% de komunaj havaĵoj, kaj samtempe la nombro de personoj bezonantaj publikan helpon por transvivi, pligrandiĝis. Oni neniam parolis pri la unua punkto, sed oni daŭre kaj multe parolas pri "senhejmuloj" kaj "senlaboruloj". La moderna lukso estas ankaŭ mezurebla laŭ la alireblecoj al servoj aŭ laŭ dispono pri libera tempo. Ilia ekzameno montras, ke la libertempoj estas vere disponeblaj nur al superaj kadruloj - 90%, kiuj kapablas kompensi la ŝarĝon de sia laboro per aĉeto de tempo de aliaj : dompurigistinoj, infangardantoj, ktp. Nur unu franco el dek foriras al vintraj sportoj.

Pristudo de aliro al Grandaj Lernejoj, al instruo kaj kulturo, montras ke la francoj el modestaj originoj estis 15,4% en 1965. Dudek ok jarojn poste ili estas 7,1%: do 54% malpli!... Ĉiuj politikistoj kaj ekonomikistoj estas diplomitoj de tiuj lernejoj, kaj konservas inter si la plej gravajn respondecpostenojn. Tamen la "egaleco" estas ilia komuna unuanima kredo.

En Britio la malriĉuloj duobliĝis depost 1980. Oni scias ke la kvarono de la riĉeco rezultas el la aktivecoj de City, kiu reprezentas 11 % de monda fluso de kapitaloj, kaj grandan parton de "lavado". City organizas trifoje pli da transakcioj ol Novjorko en la ŝanĝmerkato, kio bone klarigas la plialtiĝon eksterordinaran de financmerkato dum la jaro 1990. La valoroj interŝanĝitaj en la Pariza Borso plialtiĝis de 20% al 120% de la ŝtata buĝeto inter 1975 kaj 1995.

En 1990 estis 25000 entreprenoj borse kvotitaj en la mondo. Hodiaŭ estas 35000: plialtiĝo de 40%.

Antaŭ 50 jaroj ni estis 2,5 miliardoj. Mezaj kalkuloj de UNo antaŭvidas la evoluon de homaro de aktualaj 6 miliardoj al 8-9 miliardoj en 2050, kaj tio en nuna kaj limigita spaco. Ekzemple la arbaroj servas kiel protekto de rezervoj de biodiversaĵoj, kiel reguliganto de klimato, kiel rezervejo de karbono ktp. Arbaroj loĝigas pli ol duonon de vivantaj specimenoj en la mondo kaj ili konfrontas la mondan krizon. Preskaŭ duono el ili estis detruitaj dum la lasta jarcento. Ĉiutage, ĉiuminute ni perdas ĉirkaŭ 26 hektarojn de arbaroj, kio egalas al 37 futbalterenoj. Oni devas trovi bildojn, ĉar oni ne plu povas prezenti facile al si tiun fenomenon. La malarbarigo en tropikoj atingas pli ol 130.000 km2 jare - preskaŭ kvarono de la franca teritorio.

La arbaroj ankaŭ helpas subteni la akvofontojn kaj redukti la erozion de la tereno. La malarbarigo kontraŭas tiujn du mekanismojn. Junaj arboj stokas pli da karbono ol iu ajn tera ekosistemo, preskaŭ 40%. Ilia forigo malhelpas la stokadon de 20% el la jara karboneligo. Kiam oni scias kiaj klimataj ŝanĝoj okazas pro ekscesa eligo de la karbono produktita per niaj aktivaĵoj kaj ke la ebleco havi akvon estos la plej gravaj problemoj de venontaj jaroj, estas facile kompreni ke okupiĝi pri la medio jam delonge ne plu estas okupiĝo pri etaj floroj kaj birdetoj. Temas pri la vivo de la homaro, pri ligoj inter ĝi kaj la naturo kie ili vivas. La konoj evoluigis tiun ĉi konscion, kaj la kunvenoj de Stokholmo kaj Rio progresigis instituciigon kaj administradon de la medio.

Jen la parto de artikolo de sinjorino Anne-Marie Ducroux kiu certe estas pripensiga kaj certe provokos diskutojn inter niaj legantoj. Kun plezuro ni aperigos viajn opiniojn en la venontaj numeroj de Sennaciulo.

La redaktoro

PHILIPS

LA LUMO ESTINGIĜAS

Mallonge antaŭ la jarŝanĝo la estraro de Philips en Belgio kunvokis la laboristaron por anonci la finon de aktiveco en la fabriko en Hasselt. Inter decembro 2002 kaj julio 2003,1400 homoj perdos sian postenon kaj povos prezenti sin ĉe la senlaborkaso por ricevi la almozon, kiu senlabormono estas.

Problemo estas ke la plejmulto de la homoj dum jaroj laboris en Philips establo de Hasselt kaj same longe faris specifan laboron tre specialigitan. Laŭ informo, la laborantoj ĉiuj estas alte kvalifikitaj kaj pro manko de komparebla entrepreno/ laboro nur malmultaj povos trovi alian laboron.

En intervjuo en la nacia televido, ministro Steve Stevaert, iama urbestro de Hasselt, deklaris ke Philips disponis pri fabrikhaloj konstruitaj de la urbo Hasselt por kiuj ĝi apenaŭ devis pagi rekompenson. Laŭ Stevaert la urbo Hasselt faris dum jaroj, ĉion por ke Philips sentu sin agrable kaj komforte en Hasselt, sed kun, kiel montriĝas nun, vana rezulto. Entrepreno kiel Philips ĝuas ankaŭ favoran impostinterkonsenton. Tamen la kapitalismo jam antaŭ jaroj malkovris la landojn kie ili sub tute aliaj kondiĉoj povas laborigi homojn. Legu pri tio mian tekston kiu aperis en Sennaciulo (1151) de majo 2001, paĝoj 68-69.

Pri la sorto de la laborantoj en Hasselt, Philips ne havas intereson, ankaŭ ne pri la sorto de laboristoj ie ajn. La nura intereso de entreprenoj kiel Philips estas gajni monon. La sorto aŭ sopiroj de la laboranta klaso lasas la gvidantojn de multnaciaj entreprenoj tute indiferenta.

Philips evidente ne estas la sola multnacia kompanio kiu agadas tiel. Ili nur sekvas la fluon de la kapitalisma havemo. Ĉiam pli, kaj la maniero kiel atingi tion ne gravas. Ĉu homoj devas mizere vivi aŭ eĉ morti al ili egalas.


Mi ofte faras al mi demandon ĉu la homoj kiuj gvidas multnaciajn entreprenojn ne havas koron aŭ sentojn. Ankaŭ la ministro de entreprenoj, Jacques Gabriels, ne komprenas ke entrepreno kiu ĝuis ĉiujn favorajn kondiĉojn kiuj eblas, kiu ricevis miliardojn da belgaj frankoj kiel subtenon kaj helpon, nun tutsimple fermas la pordon kaj maldungas centojn da homoj.

La sindikatoj grumblas, sed mi faras al mi demandon, ĉu ili ankau faras konkludojn el la «katastrofo». En la liberala ekonomia pejzaĝo la salajroj de laboristoj el la okcidentaj landoj estas ne plu konkurencaj kun aliaj landoj. La «libera merkato» serĉas lokon kie oni povas laborigi homojn sub la plej skandalaj kondiĉoj, prefere sen kontrolo de ŝtatoj aŭ sindikatoj.

Mi ja faras al mi demandojn, kio okazos kiam la landoj, kiujn la kapitalista mondo dum jaroj ekspluatis, rebatos kaj postulos siajn jarojn de abundeco. Kiam ankaŭ tiuj laboristoj postulos decan salajron.

Nun la multnaciaj entreprenoj translokigas fabrikojn al landoj kun malfortaj aŭ apenaŭ ekzistantaj sindikatoj. Niaj sindikatoj de la riĉaj landoj kunkulpas ke en la malriĉaj landoj ne ekzistas fortaj strukturoj. Niaj politikistoj kaj sindikatoj kulpas ke en la 3a mondo oni nun povas ekspluatadi laboristojn pro dumjara politiko de protektismo de la propra butiko. Internacia solidareco absolute ne ekzistas kaj tio dank 'al la malbona agado de niaj sindikatoj, la sindikatoj de la «riĉaj landoj».

Dum jardekoj ni devis minaci la sistemon en iama Sovetio kaj ideo de socialismo estis ridindigata de la kapitalisma forto. Nun kiam la Orientaj landoj konvertiĝis al kapitalismo, la multnaciaj entreprenoj tuj pretas ekspluatadi laboristojn en ĉi tiuj landoj.Laborigi ilin pagante



kvaronon de la salajro kiun ni ricevas. Kion ni povas diri; «pardonu kamarado sed via salajro estas tro malalta, vi devas esti solidara kun ni kaj postuli pli altan salajron». Jes mi konstatis ke ni kuraĝas pensi tion, sed mi ankaŭ komprenas ke la kamaradoj el la malriĉaj landoj nun ankaŭ volas havi iom pli komfortan vivon.

Eble ni laboristoj el okcidentaj landoj faris grandajn erarojn, pro kiuj ni nun pagas la tro altan prezon. Ni ĉiam postulis pli altan salajron kaj la kapitalistoj etkvante aldonis. Rekompense la sindikatoj kaj ni silentis. Tiel ni iĝis la dekstra mano de la kapitalismo. Sistemon kiu minacas la laboristaron ni subtenis anstataŭ kontraŭbatali. Evidente kulpas ankaŭ la apogantoj de la diktatoro Stalin. Sub masko krei socialismon li kreis al si mem ŝtatkapitalismon kiu estis eĉ pli kruda ol la kapitalismo de la multnacia entrepreno.

Ni laboristoj estas parto de la varo de la kapitalisma potenco. Imagu ke estro de Philips kuraĝis diri ke kelkaj dekoj da laboristoj povas havi postenon en Madagaskaro en loka fabriko tie.
Ĉu ni nun devas aplaŭdi.

Post Renault Vilvoorde, Forge de Clabeque, Sabena nun Philips elŝaltas la lumon en Belgio. Kiu sekvas?

Jakvo

AVERTO : Après l'empire (Post la imperio), estas la titolo de freŝdata libro, france skribita de Emmanuel Todd. Laŭ mi, tiu verko indus esti tradukita en aliaj nacilingvoj (ankaŭ esperante, kompreneble) pro la gravaj debatoj, kiujn ĝi povas naski. Pri ĝi mi verkis recenzon origine en la franca (aperinta en bulteno «L'Universaliste», n° 64, janvier 2003). La esperantigon de tiu recenzo mi prezentas ĉi-poste al la legantoj.

POST LA IMPERIO

... Tia estas la titolo de la Eseo pri la diseriĝo de la amerika sistemo, kiun ĵus publikigis Emmanuel Todd ĉe la franca eldonisto Gallimard.

Imperio prezentas du fundamentajn karakterojn, asertas la aŭtoro ; unue, militan trudon, kiu permesas al ĝi preni tributon el la superregataj popoloj ; poste, iun universalisman dimension, per kiu «la centro fine traktas la konkeritajn popolojn kiel normalajn civitanojn kaj la normalajn civitanojn kiel konkeritajn popolojn» (p. 95). Nu, la tutmondiĝa procezo nuntempe fariĝanta neniel povas finiĝi per la elstaro de iu usona imperio, ĉar se Usono, ja pli diferencisma (rim. aŭ komunecisma, etnicisma) ol universalisma, bezonas la mondon, tio ne estas reciproka, tiel tiu lasta, multe tro vasta, industriigita, dinamika, pli kaj pli edukita, povas malbezoni Usonon. La aŭtoro unue pensas pri l'grandaj regnoj de Eŭrazio, kiuj rekte interesas Usonon pro siaj minrimedoj kaj industria potenco. Post tio, ke ĝi spertis grandan regreson meze de la 1990aj jaroj, Rusio estas rehavanta sian perditan potencon kaj la mallertaj provokoj telekondukitaj de onklo Sam ĉe ĝiaj marĝenoj (notinde en Kaŭkazo) nenion ŝanĝos al tio. Kvankam arme subigitaj, Japanio kaj okcidenta Eŭropo (tiu lasta estas la unua monda industripotenco), okaze de neceseco, povas rapidege disvolvi la armkapablon, kiu mankas al ili. Certe, en tiu geopolitika kunteksto, la islama mondo ŝajnas ege malforta : ĝi prezentas, notas Todd, nur teatran kontraŭanton (vd. Peter Franssen : «Irako apenaŭ disponas aerkarabenon kompare kun la nuklea kaj klasika armkapablo de Usono» [la 11an de septembro, EPO]), malamikon, kiu permesas al onklo Sam elmontri siajn muskolojn. Sed ĝi eniris la moderniĝan vojon, de kiu la malaltiĝo de la naskeco kaj la progreso de la alfabetigo estas du ĉefaj indicoj ; iom malfruaj tiurilate, notinde kompare kun Irano, Pakistano kaj Saud-Arabio povus baldaŭ sperti gravajn krizojn.

En sia studo pri Eŭrazio, Todd montras do ke onklo Sam kolizias al seriozaj uloj : Japanio, Rusio, okcidenta Eŭropo... Miaopinie, tamen, li grave subtaksas Ĉinion, apenaŭ menciitan ĉi tie, se ne kiam ĝi estas nomita duaranga potenco (p. 223)... Tiu lando kun 1,2 miliardo da loĝantoj, plene ekspansianta depost 20 jaroj, nun malbezonas pli kaj pli bone la ceteran mondon ĉar ĝi disvolvas sian propran interan merkaton. Ni jam rimarkigis ke la invado Afganistanon far Usono planita antaŭ la 11an de septembro 2001, celis almenaŭ tiom Ĉinion, kiom Rusion. Estas ja Pekino, kiu estas la iniciatoro de internacia konsento koncerne centran Azion, pri kiu la gazetaro ne multe parolis : la Grupo de Ŝhanhai direktita kontraŭ la islamismon ŝajne, la usonan hegemonion fundamente ; tiu interkonsento, krom Rusio kaj Ĉinio, asociigas Kazaĥion, Kirgizlandon kaj Taĝikistanon. Laŭ nova konsento, samloke subskribita la 15an de junio 2001, Uzbekistano kuniĝis kun la supremenciitaj ŝtatoj por fondi la Kunlaboran Organizon de Ŝanhai (vd. La artikolon de Gilbert Achcar, «Triangula ludo inter Vaŝingtono, Moskvo kaj Pekino», Le Monde diplomatique, decembro 2001).

... La diseriĝo de la amerika sistemo... Ameriko... La aŭtoro trouzas tiun vorton – de ĝi lia verko estas plenplenigita -, kiu, fakte, koncernas nur kelkajn ŝtatojn sur parto de la norda duono de tiu kontinento, kiuj ariĝis kaj federiĝis. Ni jam kritikis tiun imperiisman uzadon, kiu sufokas la tutan homan diversecon de Ameriko (vd L'Universaliste, n° 63, p. 3, kie ni notinde montras, ke Esperanto, kiu uzas la terminon Usono – siglo, kiu signifas Unuiĝintajn Ŝtatojn de Norda Ameriko – estas ja pli rigora tiurilate) ; eĉ la termino U.S.A. (United States of Amerika) ne estas kontentiga ĉar ankaŭ Brazilo kaj Kanado konsistigas unuiĝintajn ŝtatojn de Ameriko. Todd trafe montras, ke la nuna procezo de tutmondiĝo finiĝis per tutmonda fakiĝo, transforminte Usonon en Keynesan ŝtaton, kosumanton, kiu subtenas la mendon, kaj la ceteran mondon en produktantojn. Onklo Sam tamen daŭre estas grava produktanto de armiloj (la unua)... kaj de dolaroj. Sed tiu lasta monopolo, financa, al ĝi estas pli kaj pli kontestata far okcidenta Eŭropo, kies transpaso al eŭro, se ĝia sukceso konfirmiĝas kaj se Britio kuniĝas kun Eŭrolando, riskas rapide konsistigi gravegan danĝeron al usona hegemonio.

«Inter 1970 kaj 2000 en Usono, oni ja spektis, taksas Todd, procezon de socia polusiĝo laŭ romia modelo, kiu kombinas disvolviĝon de plutokratio kaj ampleksiĝon de plebo, laŭ la senco, kiun tiu vorto havis dum la imperia epoko» (p. 91). La aludo pri romia dekadenco, kvankam implicita, estas tamen klarega. La titolo Post la imperio entenas tiurilate notindan kontraŭecon ĉar laŭ la kriterioj mem de la aŭtoro (kaj kontraŭe al tio, kion ni foje skribis ĉi tie mem, atribuante al Buŝ la titolon lasta Imperiestro ekzemple... sed kie estas la antaŭaj ?), neniam estis, nek estos, Usona imperio, eĉ se tiu lasta ŝajnis skiziĝi dum la freŝdata historio ; tiel Usono estus iomete kiel tiuj gigantaj planedoj (Jupitero), kiuj ne sukcesis ekigi la procezon de termonuklea fuzio por transformiĝi en stelon. Levi-Strauss iris pli malproksimen : «Ruza spritulo difinis Amerikon kiel landon kiu transpasis de barbareco ĝis dekadenco sen sperti civilizacion» (Tristes Tropiques, ĉap 11). Tamen, ĉu la konceptoj de grandeco kaj dekadenco ankoraŭ havas sencon en nia moderna epoko, kiam ĉio mirinde akceliĝas ?

Emmanuel Todd famiĝis komence de la 1990aj jaroj, sekve de la eventoj en Sovetunio, kies dissplitiĝon li estis antaŭvidita ekde 1976 en La Chute finale («La fina Disfalo», Robert Laffont eld.), en epoko kiam ĉiuj imagis la malon. Ekde tiu unua verko, pruviĝis ke tiu aŭtoro ja ne estas revoluciulo, kion li ne ĉesis konfirmi, interalie per tiu lasta publikaĵo. Tiel, laŭ li, la kapitalismo estas la nura racia ekonomia organizado (p. 113). La hasta maniero per kiu li traktas, bloke, la komunismon (doktrino kaj praktiko de servuteco, p. 178), la mastrumitan ekonomion (fiasko sen apelacio, p. 14) kaj la rusan revolucion, kiu «estus proponinta al la planedo la gulagon por ĉiuj» (p. 128... li tamen agnoskas, aliloke, la rimarkindajn sukcesojn pri alfabetigado realigitajn de Sovetunio ĝis siaj periferiaj ŝtatoj), igas lin malmulte suspekta pri simpatioj al la maldeskstrularo. Kvankam li estas notinde malproksima de la valoroj de la socia movado, kies esenco estas fundamente universalima, tiu aŭtoro elmontras tamen ege trafe la diferencon, la fosegon, kiu kuŝas inter la imperiismo de (tio, kion il nomas) Ameriko, kiu "pretendas enpersonigi ian ekskluzivan homan idealon" kaj la vera universalismo, kiu "de ĉiuj mondoj konservas la plej bonan" (p. 143).

Todd estas optimisma aŭtoro, ja pli subtila kaj sagaca ol Fukuyama. La originala maniero per kiu li traktas sian temon en tiu riĉega verko (...kaj densega : nur 222 paĝoj), maniero ne nur geopolitika sed ankaŭ antropologia (diversaj tabeloj elmontras la tutmondajn kvotojn de fekundeco, de alfabetigo, aŭ ankoraŭ de memmortigoj) kuniĝas – certe malgraŭ li sendube -, kun la historia kaj materialista metodo kara por la marksistoj, kiu estas ankoraŭ nun la plej bona analizilo de la homaro kaj ties historio.

fino: paĝo 15

El la ret@ SAT-diskutejo

El SAT-diskutejo

Certe ne estis fulmotondro ĉe klara ĉielo, kiam ni povis legi en la diskutejo ke pluraj k-doj el Hispanio decidis krei novan LEA-on. Post la sinsekvaj atakoj, aŭ ĉu ni daŭre povas paroli pri «kritiko»(?) al SAT en la revuo «Kajeroj el la Sudo», redaktata de Jesuo de las Heras? Kritiko estas io tute alia ol privata milito de unu persono, subtenanto de la liberaj rajtoj de falangistoj ol funde pripensita kritiko al malbon- aŭ fi-funkciado de personoj aŭ instancoj en SAT.

Do la informo rilatis al la kreota nova LEA. Tiuj, kiuj sekvas la evoluon en la sino de LEA scias ke jam dum pli ol unu jaro ĉi tiu malagrabla decido devas esti farita. Sed kiu povas akcepti ke redaktanto sub la ŝildo de rajto al libera esprimado donas forumon al faŝisma organizo, defendi siajn atakojn kontraŭ laboristoj kaj sian subtenon al faŝista registaro dum kaj post la hispana interna milito en la 30-aj jaroj? Skribis Tonyo pri tio: —En tiu ĉi momento SAT-en-Hispanio ne havas estraron, nek formitan orga-nizon, eĉ ne kotizon; ĉio ĉi havos sian postan momenton. Se vi deziras pliajn informojn, vi povas skribi al nia adreso satenhispanio@eresmas.com. Vi ankaŭ povas kontakti la antaŭan aŭ la novan perantojn de SAT en Hispanio, Marteno Bustín kaj Pedro A. Hernández (respektivaj adresoj: <marteno@ctv.es> kaj esperanto@mi.madritel.es), aŭ min mem, Toño del Barrio, <tonyodelbarrio@teleline.es>, kiu provizore servas kiel kunordiganto de la afero.

Ni petas vian kunlaboron en la antaŭenigo de la progresemaj ideoj en la Esperanto-movado kaj de Esperanto en la progresemaj medioj. Ni esperas esti kapablaj disvolvi taŭgajn agadojn en tiu direkto. Ni bonvenigas ĉiujn viajn ideojn kaj iniciatojn.

Djemil reagis :Mi tutkore salutas la naskiĝon de SATEH kaj deziras al ĝi, kiel al ĉiuj LEA-oj fruktodonan laboron.

Sed samtempe, la LEA-oj devus, kiel eble plej bone, kunlabori kun la landaj asocioj de UEA. Ni malŝparas multe da energio pro ne, aŭ malbone, kunordigitaj laboroj, komence, je la baza nivelo, de la instruado de la lingvo. Mi bone scias ke tio ne ĉiam estas facila, sed tio devus almenaŭ esti nia komuna celo.

Interesa estas la reago de Gary: Kelkaj LEA-oj estas tro malfortaj por entute okupiĝi pri instruado kaj en la plej granda parto de la mondo ili eĉ ne ekzistas. Jam pro tio la kunlaboro tiukampa estas necesa. Gravus trovi manierojn por teni kontakton kun lernantoj de Esperanto kaj novaj esperantistoj, kies politikaj simpatioj inklinigas ilin en nia direkto, kaj kiuj ne havas personan, senperan kontakton kun SAT-anoj. Mi pensas precipe pri tiuj, kiuj estas rete atingeblaj. Kompreneble, oni ne rajtas provi enbati kojnon inter ili kaj la «neŭtralaj» esperantistoj, kiuj estas eble la solaj, kun kiuj ili havas senperan kontakton.

Ankaŭ Jakvo reagis precipe pri la eblo donita al la falangistoj havi liberan forumon en progresema medio:

Mi denove diras kaj se necesas eterne ripetos. SAT povas kaj devas kunlabori kun ĉiuj strukturoj (krom faŝismaj laŭ mi), sed nur KAJ NUR, sur nivelo de ambaŭflanka respekto kaj komprenemo. Nur, kiel egalaj partneroj, kunlaboro kun aliaj povas okazi. Se iu volas ludi mastron, li perfortas la statuton de SAT kaj ĉiu kunlaboro devas esti tuj nuligita. Oni povas krei kukon nur kiam la ingrediencoj povas kunfandiĝi. Reakcia kaj progresema ne povas kunfandiĝi sen problemoj.

Evidente post la okazaĵoj en Moskvo kun la okupado de la teatro okazis diskuto. Estis Franciska kiu malfermis ĝin. La diskuto plejparte rilatis la manieron laŭ kiu oni «Liberigis» la homojn, kaptitaj en la teatro.

Pedro A. Hernández parolis tiel: Mi ne apogas Putin en multaj temoj, sed mi pensas ke Putin agis «bone kaj ĝuste», kaj mi pretas diskuti la aferon kun ĉiuj, kiuj volas diskuti.

Kara Jakvo, se vi kritikas la agon de la rusaj policistoj, vi devus almenau diri kion ili devus fari anstataŭe. Kelke dudek virinoj en la teatrejo, kun amaso da bomboj ĉirkau si, bezonas nur kelkajn sekundojn por eksplodigi la teatrejon kaj mortigi sin, la aliajn teroristojn, ĈIUJN ostaĝojn kaj ankoraŭ preskaŭ mil homoj (policistoj, kuracistoj kaj fajrobrigadistoj kaj aliaj homoj, kiuj ĉirkauis la konstruaĵon). Nur kelkajn sekundojn. Kompreneble estas ege bedaŭrinda la morto de centdudek homoj. Sed mi ne konas alian elirejon. Se la policistoj agus aliamaniere, mortus preskau dumil personoj. Karaj geamikoj, kion vi proponus al Putin? Atendi ĝis tiam, kiam la teroristoj mortigos unu ostaĝon post la alia? Obei la teroristojn kaj montri, ke la teroro estas la plej bona maniero por atingi ion ajn?

Parte el la reago de Jakvo: Mi ja ne komprenas ke vi parolas pri teroristoj. Mi almenaŭ ne konsideras la homojn kiuj armite okupis la teatron - teroristoj. Vi scias ke ilia lando estas okupata de la rusoj. Ne ili atakis Ruslandon sed inverse. Mi nun devas esti singarda ĉar povus aspekti ke mi defendas armitan batalon kaj tio absolute estas kontraŭ mia vivmaniero.

Ĉu ne estus multege pli bone se Putin ekstartus packonferencon pri Ĉeĉenio. Ĉu la okupado fare de la Rusa armeo ne jam sufiĉe longe malkonstruas la landon? Ĉu ankaŭ vi ne pensas ke estus pli bone se Ruslando anstataŭ ludi malgrandan Usonon, komencus fari klopodojn tiri la landon al pli bona vivnivelo.

Interveno de Francisko estis: Kion klarigas Pedro, oni povas kompreni kiel urĝan senesperan agon ĵus antaù la eksplodo de la teatro. Sed dum tiuj tri antaŭaj tagoj, ĉu ne estus ebleco trovi peranton por traktadi? Tio jam okazis en similaj cirkonstancoj, en Libano ekzemple, antaŭ nun ĉirkaŭ 20 jaroj.
Pedro havis interesan tekston pri la afero sed bedaŭrinde nur en la rusa lingvo. Pro manko de esperanta teksto ni maltrafis la klarigon.
La diskuto okazis precipe inter Pedro kaj Jakvo, sed mi esperas ke ĉiuj k-doj profitis pri la spertoj kiujn Pedro havas pri Ruslando, lando al li tre kara.
Valente Giuseppe sendis informon pri:
SFE-SOCIA ESPERANTO FORUMO partoprenos la «Eŭropa Socia Forumo»-n en Florenco dum la tagoj 7-a kaj 8-a de novembro.

Denove pri la masakro en Moskvo, Luiz Alberto de Oliveira Coelho demandis:
Mi aŭdis ke al la kuracistoj la rusa registaro NE informis la nomon de la uzita gaso, do ne eblis trovi la kontraŭvenenon. La rusa registaro malvarme, sensente kondamnis tiujn homojn al morto.
Laŭ reago de Pedro tio estas malamika propagando kaj li respondis: Jes vi aŭdis tion, de la okcidentaj amaskomunikiloj. Sed kion mi aŭdis estas tute alia. La kuracistoj JES havis informon pri la necesaj rimedoj, kiuj estis tuj uzitaj. Aliflanke, la gaso ne estis la rekta kaŭzo de la mortigo.
Pri la sama temo skribis Djemil: En la vivo oni provas elekti sian lokon, sian rolon. Putin akceptis esti ĉefrolulo de la rusa registaro, do li devas akcepti la kritikojn, kiel ĉiuj aliaj naciaj gvidantoj. Kompreneble kritiki estas facile, pli ol regi. Mi preferas mian lokon de civitano kritikanto ol tiu de politika gvidanto. Do la demando pri kio, tiu aŭ alia Kdo farus en la loko de Putin (aŭ de Bush, kial ne?) ne estas valora. Tamen, ni provu eviti la cinikismon. En nia nuntempa socio, neniam mi pravigos, tiom la agadon de la potenculoj, kiom tiun de la subpremataj teroristoj.

Al demando kiamaniere tiom da homoj povas veni en la urbon kaj poste en la teatron kun la armiloj kaj bomboj, Emilo Mas respondas : hieraŭ, sur «France-info» (franca nacia radio elsendejo), mi aŭdis ke la «teroristoj» pagis plurajn policistojn, eĉ plurajn militistojn, por ke ili «fermu la okulojn», dum la vojaĝo de tiuj «teroristoj».

Tetu Makino, japana k-do, informis nin pri : 13 nunaj kaj antaŭaj laboristinoj en loka banko en Tokio gajnis historian venkon tra 15-jarojn longa juĝeja batalo kontraŭ seksa diskriminacio.
La 13 laboristinoj kaj Siba Sinkin Banko atingis kompromison interhelpatan de la Supera Juĝejo 24an Oktobro. La kompromiso postulas de Siba Sinkin Banko fini diskriminacion kontraŭ virinoj pri promocio kaj salajroj.

La kompromiso vokas la bankon promocii 6 plendantinojn al ĉefoj de sekcioj kaj kompensi la diferencon en salajroj kaj aliaj allasoj. Por pagi tion al la 6 retiriĝintaj la banko devas kalkuli kiom ili estus ricevintaj en ĉi tiuj postenoj.
En 1968 la banko manipulis la sindikaton al fendiĝo por diskriminacii anojn de la progresema sindikato pri promocio kaj salajroj.
Tio montras denove ke la batalo por egalrajto daŭre devas okazi, bedaŭrinde.
Paul Hewitt uzis la informon por meti ĝin sur la TTT-paĝo de http://www.labourstart.org/eo/ kiu informas en pluraj ligvoj pri sindikataj luktoj en la tuta mondo.

Claude Glady skribis: En la numero 11-a de «CADRATURE», revuo de la franclingva Nacia Grupo de la Superaj Oficistoj (= kadroj) «GNC», parto de la Belga Kristana Sindikato (CNE-CSC-ACV), aperis en septembro ampleksa dosiero (13-paĝa plus la frontartikolo) pri Esperanto. Ĝi ne nur prezentas la internacian lingvon simpatie (La frontpaĝo amuze prezentas du gejunulojn kiuj sin kisas per longaj langoj por paroli sub la vorto ESPERANTO) kaj pozitive. Sed pli grave, en la frontartikolo, verkita de la nacia sekretario de GNC Thierry Baudson, Esperanto estas prezentata kiel eble necesa estonta rimedo por la sindikata movado kaj por la demokratio. Jen kiel oni agas en SAT en kunlaboro kun sidikatoj. Grava helpanto en komunikado kun sindikato en Belgio estas nia amiko Georges Sossois.

Nathan M. Gant publikigis leteron de Billy Waldon en la diskutejo, certe aperos la tuta letero en S-ulo.

Lucien Bresler prave skribis: La Iraka registaro devas laŭ la rezolucio 1441 ĉesigi la fabrikadon de amasaj detruarmiloj. Mi ne estas kontraŭ tio, kondiĉe ke tiu rezolucio ne estu nur por Irako sed por ĉiuj naciaj landoj.
Interalie estis reago de Franciska: Ankaŭ mi tute dividas la opinion de Lucien Bresler. Kiel niaj politikistoj - ni voĉdonos je la 30a de tiu ĉi monato en Viktorio- povas promesi pliboniĝon de la eduksistemo, sansistemo, dungado kiam samtempe la lando sin preparas al milito ?
Mi ne komprenas kiel iu lando povas peti de alia tion, kion ĝi ne petas de si mem.
Kaj de Tonyo, kiu absolute certe pravis dirante: Fakte ne necesus speciala rezolucio. Jam ekzistas interkonsentoj pri tiaj armiloj. Ekzemple, ekzistas traktatoj pri malpermeso de nukleaj armiloj. Ĝi ne nur malpermesas la konstruadon de novaj atombomboj al landoj kiuj ne havis ilin, sed ankaŭ devigas la jam posedintojn ke ili malpligrandigu sian stokon. Pri la unua parto ĝi iom fiaskis; por la dua neniu granda ŝtato iam memoris pri la ekzisto de tiu sindevigo.
Jam tempo estas ke oni entreprenu seriozan fordetruon de ĉiuj amasmurdaj armiloj, fare de ĈIUJ landoj.

De NISHIKAWA Satoru ni ricevis sekvan informon
«La plej alta juĝejo en Usono juĝis, ke la kontraŭ-samseksama leĝo en unu ŝtato en Usono estas laŭ-leĝa kun La Plej Alta Konstitucio de Usono».
Por gejoj, kaj anbaŭseksamantoj (kiel mi), tiu ĉi juĝo estas same kiel «Ni ne rajtas ami iun ajn kiun vi amas»! Tiu ĉi juĝo devas esti kontraŭa por ni gejoj kaj ambaŭseksamantoj.
Diskriminacioj kontraŭ samseksamantoj estas forte ligitaj diskriminacioj kontraŭ (ankaŭ!) aliseksamantoj.

Ĉar en nia socio, en kiu ni devas geedziĝi kun aliseksamanto kaj ni devas naski bebon por posta kreskado de homo, ni ne devas elekti ne geedziĝi nek ne naski kaj kreskigi sian bebon. Ankaŭ se inter geedzoj ne povas naskiĝi bebo, ili devas esti punitaj en nia socio, en kiu devigas aliseksamantoj. Respondo el Ĉilio: Mi solidaras kun via maltrankvilo pri tiu ĉi danĝera fiago. La jam malferma faŝismiĝo de la Usona reganta potenculoro plu surprizigos nin per pliaj agoj tiaj. Do ĉiuj subprematoj, inkluzive gejoj kaj amabaŭseksemuloj devas kontraŭstari la novan ordon nun perforte altrudatan al la mondo.

José Antonio Vergara, al kiu Franciska respondis per : « En la jaro 1980, Prof. Danner en la Humbolt Universitato, Berlino, trovis ke multaj samseksaj viroj naskiĝis en 1944 aŭ 1945 en Berlino. Li supozis ke la streĉoj de bombadoj ĉirkaŭ la fino de la 2a Monda Milito ŝanĝis en la gravedulino la kvanton de streĉa hormono, kiu iras al la cerbo per sanga cirkulado, do vira cerbo viriniĝis. Per eksperimentoj de streĉ-dono al gravedaj bestoj kiel la rato aŭ la ŝafo, oni konstatis ke ili sekse agis kiel samseksuloj post sia kreskado. Tio okazis per streĉo-hormono (steroid-hormono) el la sur-rena glando kiu estas tre simila al la seksa hormono je la vidpunkto de kemia strukturo. Tial eĉ en la homo, la streĉo produktus samseksulojn . Oni jam scias ke la cerbo de la feto ŝanĝiĝas al la aliseksa cerbo, kaj montras aliseksan konduton post sia kreskado, kiam li havas malsanon kiu okazigas neordinaran sekreciadon de seksaj hormonoj.»

Pro la fakto ke en la sesdekaj jaroj en Germanio la samseksuloj estis ankoraŭ malliberigitaj, tiu konstato eblis. Kompreneble tio ne estas la nuraj kialoj. Tamen kiel eblas krei la kondiĉojn per perforto, milito.... kaj samtempe puni la viktimojn ?

SAT-anoj, la laboro ne mankas, ĉu ? Renato publikigis tekston (efektive ege interesan) pri la diskuto de SAT. Kiel listprizorganto Jakvo protestis pri la uzado de la angla en esperantlingva diskutejo. La sekvajn diskutojn mi volas ŝpari al la legantoj de S-ulo. Okazis la malnovaj diskutoj de liberecanoj kontraŭ komunistoj, de SAT kontraŭ komunistoj de la tro granda potenco de liberecanoj en SAT ktp. Insultoj kaj malamikaĵoj teruris la liston. Kreŝo en iu momento referencis reage al Renato: "Mi ŝatus ke vi legu historion de SAT kaj Vivon de Lanti. El ĝi tamen oni devas lerni. Vi ja certe scias ke en la komenco preskaŭ ĉiuj fondintoj de SAT estis komunistoj - kaj entuziasmiĝis pri la Oktobra revolucio (Lanti, Bannier, Barthelmess). Lanti mem iris al la Unua laborista lando por mem sperti la bonfarton kaj feliĉon de la laboristaro. Li seniluziiĝis kaj kritikis (same kiel Ŝtajner). Ili ambaŭ tion pagis - Ŝtajner per 7000 tagoj en Siberio kaj SAT (Lanti) per kompleto kaj bankrotigo - kiu ne okazis danke al alitendencaj membroj de SAT, kiuj savis la asocion. Ekde tiam SAT estis malamika «kontraŭkomunista» (faŝista - vidu la dokumentojn de NKVD kaj poste KGB) asocio. Kaj tiel estis eĉ en «satelitaj landoj» (ne forgesu 1987 kaj malpermeson al SAT kongresi en Pollando), ĝis la falo de la berlina muro. Kaj Renato parolas pri kontraŭkomunismo de SAT. Ĉu eblas Renato? Ja, vi estas honesta persono. Estas certe ke la loko de honestaj komunistoj estas nepre en SAT, kune kun alitendencaj progresemaj esperantistoj. Ni ĉiuj kune devas progresigi kaj plifortigi nian Asocion".

Laŭ mi tio estas la plej saĝaj vortoj por fini malagrablan senutilan kaj senesperan diskuton kiu alportas al SAT nenion bonan. Ni alstrebu multtendencecon en SAT. Kiam k-doj sentas sin malhoneste pritraktataj ili ĉiam povas direkti sin al Ĝenerala Konsilantaro aŭ se necesas al Konflikt komisiono, sed antaŭ ĉio ni lernu kion signifas respekto de alies ideoj.

Evidente la elekto de tekstoj estas kiel ĉiam subjektiva. Neniu malpermesas aliajn k-dojn verki pli objektivan superrigardon.

Jakvo

Víaj reagoj

INVITO AL DEBATO

Laŭ komuniko en Sennaciulo de septembro 2002 (p.116), k-do Gilbert Ledon faris «salutparoladon nome de SAT dum la UK en Fortalezo». Mi demandas al la P.K. : 1. ĉu efektive k-do Ledon estis komisiita tion fari?; 2. ĉu la tekston de la planita interveno liveris PK? Mi ne volas anticipi la respôndon de la PK, sed tuj klarigi la kialon de mia interveno.
Ŝajnas al mi evidente, ke oni povas fari oficialan salutparoladon antaŭ kongreso aŭ simila instanco, nur se oni estis oficiale komisiita por tion fari. Krome, la teksto de tia interveno ne devas speguli la personajn ideojn de la parolanto, sed ja la vidpunkton de la komisiinta instanco. Plej verŝajne, se temas pri formala inaŭguro, kiu ne estas la taŭga momento por elvoki eventualajn problemojn, la koncerna interveno ordinare limiĝas je «Ni transdonas la saluton de...»
Ni kutimas diri, ke SAT estas ĉiu el ni. Ni scias, ke en la kadro de privataj konversacioj aŭ publikaj debatoj SAT-anoj povas tute prave mencii sian apartenon al SAT kaj esprimi personajn ideojn, kiuj diversas laŭ la personoj, ĉar ili estas diktataj nek de oficiala doktrino nek de iu estraro. Ĝuste por ebligi tiun liberecon ekzistas nia asocio. K-do Ledon povis senprobleme esprimi siajn personajn ideojn pri la kongresa temo «diverseco» dum la tiucelaj debatoj. Sed en la kadro de ceremonio, en kiu eblas nek debato nek precizigo de la esprimataj ideoj, oni ne rajtas diri: «SAT opinias tion, kio eliras el mia cerbo». Bedaŭrinde tion faris k-do Ledon per la frazo «SAT konsciis, ke el la diverseco en nacioj, rasoj kaj religioj, inter aliaj, elvolviĝas ne nur minacoj, sed senĉesaj malhumanaj konfliktoj». SAT neniam tion «konsciis», krom en la menso de k-do Ledon. li havas plene rajton adopti idealisman filozofion, laŭ kiu la konfliktoj - eble «malhumanaj» laŭ lia subjektiveco, sed normale homaj, ĉar sociaj, laŭ objektivaj kriterioj - ŝuldiĝas al la diverseco de nacioj kaj religioj - kaj eĉ de «rasoj» (!) Sed li ne rajtas kredigi, ke tia estas la opinio de ĉiuj SAT-anoj aŭ la oficiala doktrino de nia asocio.
Mi petas, ke la Plenum-Komitato sciigu sian vidpunkton. Mi invitas la legantojn de Sennaciulo al debato pri tiu ĉi problemo.

Michel Duc Goninaz, 32511



76-a SAT-KONGRESO
ĈAŬDEFONO
12-19 Julio 2003

OKK : David Buhlmann (30984), Francisko Degoul (32785), Perla Martinelli (35546), Dieter Rooke (35571), Giorgio Silfer. Ekstera pri librotenado : Sonja Brun.
Adreso : 76-a SAT-Kongreso, ĉe KCE, cp 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, (Svislando). Rete: <esperanto.kce@esperantio.net>
Tel/fakso : +41.32.9267407.

KONGRESKOTIZOJ

Kongreskotizoj :

Ĝis la dato :	31.03.03	31.05.03	Poste
SAT-membro	65 €	75 €	85 €
SAT-geedzoj(se ambaŭ SAT-anoj)	110 €	130 €	150 €
SAT-junul(in)o (ĝis 25 j)	38 €	48 €	58 €
Gasto	80 €	90 €	100 €
Gasto junul(in)o	45 €	55 €	65 €

Infanoj ĝis 15 j. ne pagas la kotizon.
La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI ĝuas 30 procentan rabaton. La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI) kaj de ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Sud-Afriko, Usono) ĝuas 50% rabaton.

Personoj el lando bezonanta enirvizon por Svislando devas indiki tion antaŭ la 31-a de marto 2003. Post tiu dato ne estos plu eble trakti ilian peton.
Por profiti la SAT-tarifojn sufiĉas aliĝi al SAT por 2003. La kongreskotizo kovras la kongresan programon kaj aneksajn (dokumentujon, ktp).

GRAVA ATENTIGO:

En la aliĝilo aperis erare nur ses tranoktadoj anstataŭ sep. Evidente en la prezoj mankas unu nokto. Oni devas aldoni unu sesonon de la indikita prezo. La bonaj prezoj estas ĉi sube :
7 TRANOKTADOJ
kun matenmanĝo

Tranoktejo T	70 €	81 €	93 €	105 €
Tranoktejo J	140 €	151 €	163 €	175 €
Tranoktejo P	210 €	221 €	233 €	245 €
Tranoktejo H	280 €	291 €	303 €	315 €

La tranoktejoj estas : T = tendumejo J = Junulgastejo P = pensiono H = hotelo
La ĉambroj estas: J = 4 ĝis 8 litoj P = 1 ĝis 2 litoj H = 1 ĝis 2 litoj
Geedzoj kaj paroj profitas rabatojn : petu ilin rekte.
Ĉiuj mendoj pasas tra la O.K.K.

UNUA KONGRESA BULTENO - 2003 01 01

ALVENTAGO KAJ INTERKONA VESPERO

La akceptejo funkcios, ekde tagmezo de sabato la 12a, ĉe la fervoja stacidomo de Ĉaŭdefono. Se vi alvenos per propra veturilo, eblos komforte parki en la apudeco de la stacidomo. De la fervoja stacidomo eblas atingi, aŭte aŭ buse, tre komforte la diversajn tranoktejojn. Deĵorantoj helpos laŭbezone. En la akceptejo eblos aĉeti la buskarton por la tuta semajno, je rabatita tarifo.

La interkona vespero okazos ekde la 20h00 en ĉarme unika lokalo: la Korto de la Antikva Maneĝo. Konsumo de trinkaĵo estos pagenda rekte al la kelnero. Eblos vespermanĝi samloke, sed ankaŭ ne manĝi tie (la sabata vespermanĝo ne estas inkluzivita en la kongresa paketo).

KONTRIBUOJ AL LA KULTURA KAJ POLITIKA PROGRAMO

Ĉiuj kongresanoj kiuj deziras proponi prelegon aŭ organizi kunvenon bonvolu kontakti la OKKon kiel eble plej baldaŭ. La agendo estos difinita jam ĉi-vintre. Ni atentigas, ke lingvokursojn (por progresantoj kaj perfektiĝantoj) organizas KCE mem en sia sidejo, kaj interesatoj povas sin adresi al: <kce.esperanto@bluewin.ch>.

EKSKURSA TAGO

Merkredon la 16an okazos la tuttaga ekskurso, kiu disvolviĝos parte buse parte piede, sed tute ene de la kantono. Matene vi atingos buse la bazon de admirinda natura amfiteatro, kiu fakte estigis la modernan geologion: ĵurasio estas epoko tiel nomata ĝuste danke al la Ĵurasa montaro! Tiuj kiuj ne povos aŭ ne volos marŝi, povos resti surloke, promeneti, kafumi en agrabla gastejo; la aliaj povos iom grimpi por admiri de proksime la unikaĵon. Post la tagmeza rekuniĝo, la ekskursantoj atingos restoracion ĉe la rivero Areuso, kie la mendintoj tagmanĝos -- famaj estas la pladoj el truto kaj la desertoj de la lokalo!



Post la tagmanĝo tiuj kiuj deziras povos siesti en la ombro de agrabla parko, aŭ kuniĝi en salono por ludi tombolon. La aliaj esploros piede la gorĝojn de la rivero, en pitoreska sed ne laciga promenado ĝis la kastelo de Boudry, kies fama vinkelo bonvenigos ĉiujn fine de la posttagmezo (inkluzive de la ruzaj tombolintoj, kiuj veturos buse ĝis la kastelo). De tie oni ree karavanos al Ĉaŭdefono, por la vespermanĝo en la kongresejo. Sekvos la vespera programo.

VEGETARANOJ SENPROBLEME

Dum la tuta kongreso la bufedo proponos je ĉiu manĝo menuon por vegetaranoj. Estas necese indiki sian vegetaranan preferon en la aliĝilo. Se iu ne faris, tiu bonvolu retmesaĝi al OKK. Dum la tuttaga ekskurso okazos vizito al restoracio fama pro siaj pladoj bazitaj sur truto. Se vi estas ne nur vegetarano, sed eĉ vegetalano, do ne manĝas fiŝojn, bonvolu tion indiki. Ankaŭ se vi ne estas vegetarano entute, sed malŝatas fiŝojn.

PENSIONO BALDAŬ ELĈERPITA

Jam pli ol 60 personoj anoncis sin por la Kongreso, kaj la kategorio P estos baldaŭ elĉerpita entute. Jam la unuopaj ĉambroj en pensiono estas elĉerpitaj. Neniu problemo por la ceteraj kategorioj (tendumejo, junulgastejo, hotelo).

ANTAŬKONGRESO EN GRINDELVALDO

Jam duono de la lokoj disponeblaj por la antaŭkongreso estas mendita. Restas preskaŭ dudeko. Se vi deziras partopreni en la semajno en Grindelvaldo (5-12 julio 2003) bonvolu anonci vin kiel eble plej baldaŭ ĉe KCE. La gvidanto de la aranĝo estas Francisko Degoul.

Dankon pro via atento.

Kultura Centro Esperantista
CP 311 - Postiers 27
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
telefono kaj fakso (41) 32 9267407; reto (OKK): <esperanto.kce@esperantio.net>; reto (kursoj): <kce.esperanto@bluewin.ch>. Pagoj (kaj donacoj) en eŭroj al la svisa poŝta banko, Postfinance, konto 91-62979-2

Ni estas ĉiuj nesalajrataj volontuloj kaj la OKK-anoj mem pagas sian kongreskotizon. La KCE-kontoro funkcias matene kaj fruvespere, de lundo ĝis vendredo (lunde ne matene), kaj okaze de monatfinaj aranĝoj.

Antaŭkongresi montare ĉe naturamikoj (05-07 / 12-07-2003)

Se vi deziros restadi du semajnojn en Svislando ĉi-somere, ne maltrafu antaŭ la SAT-kongreso la naturamikan semajnon en Grindelvaldo.

Kiam la Kultura Centro Esperantista KCE proponis tiun ideon por antaŭkongresi, mi entuziasmiĝis kaj konsentis tie ĉiĉeroni kaj organizi la programon : fakte en Alpoj tri montoj famigis tri vilaĝojn : Ŝamonikson Monto Blanka, Zermaton Cervino, ankaŭ nomata Materhorno, kaj Grindelvaldon Eiger, proksime de Jungfrau.

Sekvis lastaŭtune anonco de la aranĝo en Heroldo, poste decido de TANEF tie kaj tiam organizi sian jaran ferisemajnon, kaj far KCE antaŭmendo de 30 ĝis 40 litoj en la Grindelvalda domo de la naturamikoj.

Nun venis momento inviti vin, karaj legantoj, kaj ĉi-cele informi vin.



Pri antaŭkongreso kutima ne temas : ne atendu precize difinitan veturadon porĉiutagan, dum kiu ĉiumatene vi bezonus nur retrovi la buson por nova celo antaŭdifinita: la tutan semajnon ni dormos en la sama loko, la domo de la naturamikoj, cetere agrable situanta sur apudarbara altaĵo, fronte al la montara spektaklo, je kelkcentoj da metroj de la urbeta centro kaj stacidomo. Ĉu urbeta ? escepte de la ĉefa strato, la loko konservas tre disan, montar-vilaĝan aspekton. Cetere, pro kosto kaj malofteco de la busoj tiu diseco estas invito piediri laŭvojete en tiu ĉarma kadro.

Bonvolu do atenti la konsekvencojn.

Unue, naturamikoj havas siajn kutimojn : ili vivas simple, ŝatas promeni sed ankaŭ mem kuiri. Unulitajn ĉambrojn vi ne trovos, nur dulitajn (10 entute) kaj kvar- ĝis ses-litajn. Tagmeze, vi devos pikniki aŭ mem kuiri. Matene kaj vespere eblos elekti ĉu memkuiradon ĉu menditan manĝon.

Due, malaperos la neceso enbusiĝi ĉiumatene. Al la proponita programo portaga partoprenos libere nur la volontuloj. La aliaj rajtos ripozi aŭ organizi libere sian tagon.

Trie, la antaŭvidita programo estos, ĝis la kiel eble plej lasta momento, modifebla laŭ-vetere : tial ke la ĝuo tiea grandparte ligiĝas al pejzaĝaj spektakloj sub bela suno, valoros prokrasti antaŭviditan ekskurson se pluvos.

Kvare mi el la sep tagoj provizore povas lasi du en atendo de programo laŭ viaj propraj elektoj : unuflankeTANEF bezonas unu tagon por sia jarkunveno; aliflanke diversas la emoj : kelkaj el vi preferos elspezi malpli kaj piediri pli; aliaj pli ĝuos la ĉarmojn de sida kontemplo al la montoj per trajna, busa aŭ boata veturado. Aliaj emos al kulturaj aktivecoj. Aliaj eble emos alpismi, aŭ nur kuiri kaj promeneti en la vilaĝo... Mi do atendas viajn respondojn sur la ĉi-suba aliĝilo por difini la programon por ĉiu el la du koncernaj tagoj.

Kvine la loko invitas al migrado, kaj ĉiuj ekskursoj necesigos de du ĝis kvin horoj da piedirado. Se tio ne konvenas al vi, tre konsilindas, ke vi uzu vian propran aŭton, des pli ke tie busoj maloftas kaj multekostas.

Espereble vi nun sufiĉe bone komprenis la spiriton de tiu semajno : kunvivado en etoso libereca kaj respondeca, por partigi ĝuojn migradajn, kuirajn kaj samideanajn. Nun ni venu al precizaj informoj.

1) Alvenos la partoprenontoj la sabaton 5-an de julio. El la fervoja stacidomo tre facile atingeblas la restadejo per buso aŭ dekminuta piedirado. Per Berno kaj Interlaken facilas trajne alveni al Grindelvaldo en malpli ol tri horoj el Ĝenevo, Bazelo aŭ Zuriko, urboj senprobleme atingeblaj per trajno aŭ aviadilo. Se vi venos aŭte, vi trovos privatan parkejon, kaj evitos uzi la lokajn busojn, kostajn kaj ne tre oftajn.

2) Finiĝos la aranĝo la 12-an de julio per fervoja karavano por atingi la SAT- kongresan urbon Ĉaŭdefono.

3) Jam estas programitaj kvar tuttagaj ekskursoj, por ebligi al vi ĝui la plej belajn kaj renomajn spektaklojn de la regiono. Mi nomos la tri unuajn respektive E1, E2 kaj E3 laŭ ilia proksimuma alteco, respektive 1000-metra, 2000-metra kaj 3000-metra.

E1 koncernas la malsupran parton de la du tieaj glaĉeroj - mi preferas tiun precizan terminon al la pli kutima “ glaciejo ” : vidu PIV - . Ili nomiĝas respektive Supra Glaĉero kaj Suba Glaĉero, kaj alvenas ĝis proksime de la urbo, situanta je apenaŭ pli ol mil metroj da alteco. Tia fenomeno en Alpoj ekzistas nur en Grindelvaldo kaj Ŝamonikso. Per aranĝita ligna ŝtuparo atingeblas impresa vidaĵo supre de la Suba Glaĉero. Koncerne la Supran Glaĉeron, ege vizitindas ĝia elirejo, tio estas unukilometra faŭko pli ol cent metrojn profunda, funde de kiu serpentumas la elglaĉera torento. Antaŭ jarmiloj venis ĝis tie la glaĉero, kaj ĝi tiel krute kavigis la rokon, ke la du vidalvidaj muroj ne nur vertikalas, sed eĉ tie kaj tie kuniĝas sub aspekto de natura tunelo. El la restadejo mi gvidos 15-kilometran promenadon piedan, kiu

inkluzivos la viziton de la du menciitaj mirindaĵoj, sed homoj, kiuj preferus ŝpari siajn fortojn kaj ne disponos aŭton, povos sin limigi al 9 kilometroj, uzante busojn ire kaj revene. Por tarifo, vidu la aliĝilon.

La ekskurso E2 koncernas pli kutiman spektaklon, tamen belegan. Ni supreniros en florumitaj herbejoj sur la suda flanko de la valo, fronte al la nordaj vandoj vertikalaj de la montoj Eiger, Jungfrau kaj aliaj, diserige neĝkovritaj. Buso portos nin ĝis Bussalp, je 1800 metroj da alteco, kaj de tie ni piede atingos per trihora migrado la supron de la elstara panoramo-monto Faulhorn, je 2681metroj. Reveno okazos duhore per la rimarkinda Bachalp-lago ĝis bushaltejo en Waldspitz aŭ telfero en First, meze de la deklivo inter valo kaj pinto. Tiu ekskurso kompreneble necesigas sufiĉan kapablon piediri kelkajn horojn sur deklivaj itineroj. Tarifo : 33 eŭroj.

La ekskurso E3 gvidos nin al la fama unikaĵo " Jungfraujoch ", plej alta stacidomo fervoja en Europo. De tie, dank'al aranĝo de ŝnuraj bariloj ni povos ĝui unuhoran promenadon surneĝe en preskaŭ ebena tereno je alteco de 3500 metroj ĝis la Mönch-monto-domo, kie kutimas dormi alpistoj antaŭ grimpado al Jungfrau kaj Mönch. Revenintaj al la stacidomo, ni ne maltrafos viziton de ĝiaj diversaj aranĝoj kaj vidindaĵoj. Bonvolu tamen noti, ke la ege malfacilan konstruon de tiu fervoja linio, kiu subtunelas la Eiger nordan vandon, la fervoja kompanio sufiĉe pagigas : oni kalkulu 105 eŭrojn por la iro kaj reveno. Per grupa tarifo ni tamen pagos nur 85.

- Per la ekskurso E4 ni vizitos mirindajn akvofalojn de Trummelbach, atingeblajn per du trajnetoj kaj unuhora piedirado koste de 19 eŭroj, aŭ per propra aŭto por nur 7 eŭroj.

Krom la kvar ekskursoj menciitaj ĉi-supre, eblas ankaŭ programi laŭ viaj preferoj diversajn aliajn, inter kiuj la aliĝilo invitas vin elekti. Bonvolu do konsideri la jenajn aktivecojn eventualajn, por kiuj mi nun bedaŭrinde povas doni nur proksimumajn tarifojn :

- E5 : kulturaj vizitoj, nome unu farmbieno (senpage) kaj / aŭ la vilaĝo (4 aŭ 5 eŭroj kaze de reveno buse, senpage se oni revenas piede)
- E6 : prelego de Dr phil. Dirk Willkommen pri " Lingvo kaj naturo " : senpage
- E7 : ekskurso pieda sub la Eiger vando kun uzado de la Jungfraujoch trajneto : inter 31 kaj 37 eŭroj : la pli kosta tarifo limigas la piediradon al 2 horoj kaj 40 anstataŭ 3 kaj duono.
- E8 : alpisma grimpado kun profesia gvidisto al Jungfrau (ne tro malfacila, proksimume 450 eŭroj partigeblaj inter 2 kaj eble 3 kunŝnurigitaj klientoj) aŭ Eiger (ne per la malfacilega norda vando, tamen malfacila kaj kosta : gvidistoj petas 1000 svisajn frankojn, tio estas700 eŭrojn, kaj pro la riskoj akceptas nur po unu klienton)
- E9 : trajna, busa kaj boata rondveturado kvarhora sur montoj kaj lago ĉirkaŭ la regiono koste de iom malpli ol 50eŭroj.
- E 10 : libera tago, dum kiu ĉiu povus interalie butikumi aŭ / kaj viziti la belegan urbon turisman Interlaken, senprobleme atingeblan trajnete (15 eŭroj por iro kaj reveno) .

Bonvolu kompreneble antaŭvidi taŭgajn vestojn kaj materialon, speciale por la E2, E3, E4, E7 kaj kompreneble E8 ekskursoj : fortikaj ŝuoj, vestoj kontraŭ vento, ekpluvoj kaj malvarmo, efika protekto kontraŭ suno por manoj, okuloj kaj vizaĝo.

Pagi jam nun la tuton de la programo neeblas pro ĝia parta nedifiniteco. Tamen, pro la malgranda nombro de disponeblaj litoj, estas oportune aliĝi kiel eble plej rapide, antaŭpagante almenaŭ la aliĝon kaj la litorezervadon. Bonvolu sendi vian aliĝilon antaŭ la 15-a de aprilo, tiamaniere ke ni ricevu ĝin antaŭ la 24-a. Post tiu dato ni ne plu povos akcepti aliĝilojn . La pago de la aliĝo garantias al vi ne nur rezervadon de lito, akceptadon kaj ĉiĉeronadon, sed ankaŭ neŝanĝeblecon de la tarifoj pro eventuala modifo de la kurzoj koncerne eŭron kaj svisan frankon.

Pri la diversaj mendoj, kies prezoj ni plej ĝuste kalkulis, pagu se vi jam nun aliĝas al la koncernaj proponoj. Por ekskursoj E2 kaj E3 sufiĉe pripensu : antaŭpago evitos al vi kunporti tro da mono, kaj la organizantoj strebos elekti la plej belveterajn tagojn por tiuj ekskursoj; tamen antaŭpago estas definitiva, kaj povas okazi ke dum la plej belaj tagoj ankaŭ estos nuboj...

Por antaŭvidi vian kompletan buĝeton, bonvolu aldoni al via antaŭpago la jenajn kostojn eventualajn :
- vojaĝo al Grindelvaldo
- piknikoj : proksimume 20 eŭroj
- matenmanĝo kaj vespermanĝo memkuiritaj : proksimume 40 euroj
- kromaj ekskursoj: vidu la ĉi-suprajn informojn.

Francisko Degoul 32 785

Aliĝilon petu ĉe François Degoul, 54 rue des Caillots, FR-93100 Montreuil, Francio.
Tel: +33.1.48.58.71.94
rete: <fdegoul@wanadoo.fr>

Profesoro Hermann Ölberg – 80-jara!

En Innsbruck/Aŭstrio la de ĉiuj tre ŝatata emerita universitata profesoro d-ro Hermann Ölberg festis je la 14-a de oktobro 2002 sian 80-an naskiĝtagon. En amikeca kaj harmoniplena festeto liaj gekolegoj akcentis la ampleksajn sciencajn agadojn kaj diversajn universitatajn funkciojn de profesoro Ölberg: „antaŭromaj loknomoj (toponomastiko) en Tirolo", lektoro por la eklezia slava lingvo, laboroj en la albanologio kaj albanlingvaj kursoj, „eksterordinara profesoro por la hindoĝermana/indoeŭropa lingvo kaj por ĝenerala kaj aplikata lingvistiko" ekde la jaro 1975. Profesoro Ölberg memstare aŭ komune kun aliaj scienculoj publikigis gravajn lingvistikajn librojn kaj eldonis la faman trivoluman „Tirola Toponomastiko / Tiroler Ortsnamenskunde" de K. Finsterwalder. Ekde la jaro 1963 profesoro Ölberg eldonis ĉirkaŭ 60 volumojn de la „Innsbruckaj aldonoj al la kulturscienco / Innsbrucker Beiträge zur Kulturwissenschaft". Liaj gekolegoj ege ŝatas profesoron Ölberg ne nur pro lia diversmaniera scienca agado sed ankaŭ kiel ĉiam helpema kolego kaj precipe pro lia korvarma bonhumoro, kiun li ne perdis malgraŭ familia perdo kaj malbona sanstato.

Esperantujo ŝuldas al profesoro Ölberg dankon por diversaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj laboraĵoj; dum multaj jaroj – ekde la jaro 1953 – li prizorgis la „lektoraton por interlingvistiko (planlingvoj)" en la kadro de la universitato Innsbruck, la interlingvistikan bibliotekon kaj la regulajn universitatajn lingvokursojn en la internacia lingvo Esperanto.

Koran dankon, estimata sinjoro pofesoro d-ro Ölberg, kaj ĉion bonan por multaj pliaj jaroj akompanate de via familio!


d-ro Karner

POST LA IMPERIO - fino

Mi partoprenas en la optimismo de tiu aŭtoro, kvankam kun konvinkoj senteble malsimilaj : por la komuna estonteco de la homaro, temas pli ol iam ajn pri originala politika organizado, nek imperiisma, nek ŝtat-naciisma – sed pli proksima al federismo -, per kiu niaj ĝeneralaj interesoj devus esti mastrumitaj kun la respekto al ĉiaj homaj apartecoj. La nuntempaj esprimoj pri disvolviĝo, subevoluinteco, tria mondo, imperio, dekadenco… tiam ne plu havos grandan signifon.

Djémil KESSOUS
Decembro 2002

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris



NOVA P.I.V.

Lanĉoprezo :
por Francio 70 € + 4,27 € (afranko)
por Eŭropo: 70 € + 7 € (reg.afr.)
ekster Eŭropo :70 € + 9 € (reg. afranko).

Ni petas ĉiujn mendantojn iom pacienci ĉar ni ne estas nombraj en la oficejo kaj necesas iom da tempo por paki kaj ekspedi la menditajn librojn.

HELPO AL LA ASOCIO

En Francio (€) Cagnard 20,00; Garrigue 5,00; Orliange 50,00; Bernard 50,00; Levesque 5,00; Bes 10,00; Boré 10,00; Leclerc 50,00; Rooke 10,00; Ahado 5,00; Prevost 10,00; Nové 260,00; J. Boyer 5,00; Calas 20,00; J.J. Aumeunier 25,00; Masseron 26,00; R. Bouchet 50,00;
En Italio (€) C. Bourlot 17,50;
En Svedio (SEK) Ge-Jonasson 70,00;
En Germanio (€) Bolter 10,00; Ehlers 10,00; Brandenburg 5,00; Peach50,00;

NOVALIĜOJ

35.585 Foche Pérez Pablo Antonio, Camino Fuente de la Peña n° 16, ES-23002 Jaén, Hispanio
35.586 Vohla Frank, Buchenring 35, DE-04600 Altenburg, Germanio.
35.587 Saulnier Guy, 1 Rue Louise Michel, FR-17100 Saintes, Francio.
35.588 Moonen Johano, Uilenveld 114, NL-7827 GH Emmen, Nederlando
35.589 *Mensen Sophia, van Kleffenslaan 12, NL-4334 HJ Middelburg, Nederlando.
35.590 *Conde Rey Marie-France, 54 terrasses d'Aegyptos - 3, rue d'Alexandte, FR-16000 Angouleme, Francio

SAT havas novan domajnadreson:
www.sat-esperanto.org

KOTIZOJ - ABONOJ DE LA JARO 2003

NEPRE ATENTE LEGU LA ĈI-SUBAJN RIMARKOJN

- Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas SENNACIULON + ĝian jaran suplementon, S.R., kaj la dujaran SAT-Adresaron.
- El la indikita sumo, 40 % estas la kotizo, 60 % la abono.
- Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25j.) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
- **Help- kaj grupmembroj pagas minimume la duoblon de la plena kotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.**
- Samfamiliano de membro pagas la duonon de la plena jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekz. dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

* Pagante la sumon aparte indikitan, nemembro povas aboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon «Sennacieca Revuo».

Landaj perantoj	Valuto	Kotizo + abono	Nura abono
Argentinio : Rodolfo Calogero, Namuncura 1749, AR- Q 8302 AOW Neuquen.	€	25,00	27,00
Aŭstralio: Bernie Heinze, 1 Marne Rd., Mount Evelyn, Vict.-3796. Reto: <franciska@bigpond.com>	AUD	88,00	99,00
Aŭstrio : Dr. Klaus Karner, Krebsbach 371, AT-6414 Mieming, pĉkt.-3799.466 (Oester. postsparkasse, Wien, konto 000-0025223-03)	€	50,00	55,00
Belgio : Jacques (Jakvo) Schram, 49 Hofter Bekestraat, BE-2018 Antwerpen. Reto: <j.schram@skynet.be>	€	50,00	55,00
Bosnio-Hercegovino : Ivica Horvat,Zrtava faŝizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo	€	7,00	8,00
Brazilio : G.R.-Ledon, C.P.-269, BR-12460-000 Campos-do-Jordao-SP. Reto:<ssledon@iconet.com.br>	€	20,00	23,00
Britio : Arthur Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex, CM13-1EJ (Tel.: +44.1.277.22.89.62)	GBP	34,00	37,00
Bulgario : Dimitar Kalĉev, «Javorov» 13-2, BG-1124 Sofia. Rete: <dim-kalchev@abv.bg>	€	9,00	10,00
Ĉeĥio : Vlada Hasala, A.Dvoraka 1, CZ-69662 Straznice. Reto:<vlada_hasala@iol.cz>	CZK	580,00	630,00
Ĉinio : Wang Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiying-lu 74 Hao, CN-710054 Xi'an. Reto: <esp@pub.xaonline.sn.cn>	CNY	33,00	36,00
Danio : Ulrik Rasmussen, Nörregårdsvej 66, DK-2610 Rödovre.	DKK	400,00	450,00
Estonio : Freed Neeme, Kooli 6-26, EE-2240 Kehra.	EEK	100,00	110,00
Finnlando : Vakas	€	50,00	55,00
Francio : Pierre Quillaud, 16 rue du Lt.-Vaisseau Paris, FR-76120 Le Grand Quevilly, pĉk.-SAT Peranto n° 17 333 10 N, Paris. Reto:<pierre.quillaud@wanadoo.fr>	€	50,00	55,00
Germanio : Jiri Proŝkovec, Heimbau Str. 10, DE-44143 Dortmund,Konto n° 4 907 664100, Bankkodo: 760 260 00 NORISBANK:. Reto: <proskovec@yahoo.de>	€	50,00	55,00
Hispanio : Pedro A. Hernandez Ubeda, c/Sainz de Baranda 44-3° D, ES-28009 Madrid. Konto: 2038 1787 406000178775 Tel. 912230692, Reto:<esperanto@mi.madritel.es>	€	32,00	36,00
Hungario : Béla Kovacs, Béla kiraly u.-44, HU-7400 Kaposvar. Ĝirkonto 11773432-04632175. rete: <espbela@axelero.hu>	HUF	1500,00	1600,00
Italio : Carlo Bourlot, Via Quarello 40, IT-10135 Torino(TO) Tel: 011-3970477 (vesp. ĝis 23h), Poŝtbanka konto n° 43976158. rete:<s.bourlot@tiscalinet.it>	€	48,00	52,00
Izraelio : Jehoŝua Tilleman, 97-A, Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin.	ILS	160,00	170,00
Japanio : Hiroyuki Tani, Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561 Toyonaka-si.-Pĉk.-00980-9-37624, SAT-Nihon. Reto: <tnhryk@pop07.odn.ne.jp>	JPY	8400,00	9300,00
Jugoslavio : Ivan Moĉilnik, Pozeŝka 132, YU-11030 Beograd.	€	7,00	8,00
Kanado : Hans E. Ilginnis, P.O. Box 1133, Ladysmith, B.C. V0R 2E0, Kanado, bankkonto: Sennacieca Asocio Tutmonda CIBC, transit 540, Account n° 0747831; Rete:<hans@nanaimo.ark.com>	CAD	75,00	82,00
Kroatio : Zdenka Svetliĉiĉ, Matoŝeva 6, HR-10410 Velika Gorica, reto: <sat_hr@yahoo.com>	HRK	60,00	66,00
Latvio : Margarita Zelve, Rupniecibas 35+13, LV-1045 Riga-45	LVL	5,00	6,00
Litovio : Grazina Opulskiene, Tylioji 32-22, LT-5503 Mazeikiai, rete:<grazopul@yahoo.com>	LTL	22,00	24,00
Nederlando : Corrie Kwantes-Kooij, Marnixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem, pĉk. 2853752.	€	50,00	55,00
Norvegio : Per Engen, Østregate, NO-2300 Hamar.	NOK	410,00	450,00
Pollando : Elzbieta Janusz, ul.-Krowoderska 74/3, PL-31-158 Krakow, Bankkonto : BPH III O/Krakow 10601406-300001777438	PLZ	28,00	30,00
Portugalio : Manuel Luis Pedrosa Alves, Estrada Principal n° 79, PT-2710 -413 Morelinho-Sintra. Rete: <manuelalvespedrosa@clix.pt>	€	25,00	27,00
Rusio : Nikolao Gudskov, a/k 57, RU-105318 Moskvo, Reto: <nikolao@orc.ru>	€	8,00	9,00
Slovakio : Miro Zavodsky, Ĉsl.-brigady 67, SK-01004 Zilina-Zavodie.	SKK	440,00	480,00
Slovenio : Zlatko Tiŝljar, Inter-kulturo, Besednjakova 1, SI-62000 Maribor., Tel./fakso:+386.62.100.669	SIT	2800,00	3100,00
Svedio : Inga Johanson, Stampgatan 60.B.-127, SE-411 01 Göteborg, pĉk.-SAT c/o I.-Johanson, n°-26-63-22-7. Rete: <ishim@hotmail.com>	SEK	420,00	460,00
Svisio : Erna Döring, Poŝtfako 225, CH-4003 Basel, pĉk.-40-43136-2.	CHF	86,00	94,00
Ukrainio : Dmitrij M.-Cibulevskij, a/k 9307, UA-310003 Ĥarkovo-3	€	8,00	9,00
Usono : Dan Glass, 7366 Park View Terrac, Mounds View, MN 55112., Reto: <dglass19@earthlink.net>.	USD	70,00	78,00
Aliaj ne jam menciitaj landoj			
Eŭropo +-S.Koreio	€	33,00	36,00
Cetero de la mondo	€	20,00	22,00

Karaj gekamaradoj,
kiel vi povas konstati, ĉi-jare ni plialtigis niajn kotizojn. Fakte, jam de kvar jaroj la kotizoj estas senŝanĝaj. Sed, pro la malbona financa situacio kaj nesufiĉa membronombro, ni nepre devis plialtigi la kotizojn por la jaro 2003. Certe vi bone komprenas tiun neceson. Por helpi al niaj financoj, vi povas aldoni al via kotizo iom da mono por Helpo al la Asocio, kaj varbi, varbi. Elkoran dankon.
La P.K. de SAT